

V-20724/2

USONA

United States



REVUO

World Review

Dua Jaro (Second Year) No. 1 (5)

Milwaukee, Wis., U.S.A.

Januaro, 1950

DEDICITA AL INTERNACIA KUNLABORO PER ESPERANTO
DEVOTED TO INTERNATIONAL COOPERATION THROUGH ESPERANTO

LOOKING AT THE WORLD

Among the true "World Citizens" with a story to tell is Belgian born Mr. Gassy Marin, of Whiteway, near Stroud, Gloucestershire, Great Britain.

He once set out on a cycle tour of Africa and Asia. It took him ten years.

Mr. Marin, a Fellow of the Royal Anthropological Institute, needed information. So he bought a second-hand cycle for £3 and set off for Africa, without plans and without a time limit.

At Assouan on the Nile he sold his cycle for the same price he paid for it—£3. From there he traveled by camel, bullock cart, or on foot.

He lived with the inhabitants of the country in which he was traveling. That's how he really got to know people of diverse generics: their customs, life habits and ways of thinking.

Sometimes he moved as an Arab, sometimes as a native, wearing only loin-cloth. And once he was accused of lowering European prestige by going native. But he served well and accomplished much in his favored field of science, at the same time learning about people through his contacts with people—all kinds of people.

And what was his most striking impression? He expressed it clearly in an interview given to a British newspaper while attending an international convention. It was this:

Everywhere he went, in every country, the inhabitants believed they were the center of the world and their customs and standards were those by which other nations should be judged.

* * *

Our British friend and correspondent who sent us the information about Mr. Marin together with his picture, tells us of another interesting human story which took place at the Holm Lacey Hotel, Boscombe.

Sixteen Esperantists from several countries made their room reservations at the beginning of last year for the August convention.

Their booking raised the language problem for the proprietor, Cecil Parnell. So in February his son, Cecil, in business with him, began taking classes in the International Language.

When the guests arrived in August, Esperanto-speaking young Cecil Parnell welcomed the Esperanto guests.

* * *

This year the following prominent Esperantists from several countries of the Eastern and Western hemisphere will visit America and our headquarters in Milwaukee:

ESPERANTO EN SCIENCA GAZETO

En la grava gazeto por teoria fiziko **Progress of Theoretical Physics**, aperanta kvaronjare en Japanlando kaj redaktata plejparte en la angla lingvo, dum 1948 aperis sciencaj artikoloj verkitaj tute en Esperanto. Du pliaj artikoloj Esperantaj aperis en la sama gazeto de April-Junio, 1949. Syoŝei Miyahara, de Nagoja Universitato, verkis artikolon naŭpaĝan sub la titolo: **Pri la teorio de kolektivaj elektronoj de feromagnetismo**.

Altestimata membro de nia Fondajo, D-ro F. J. Belinfante, profesoro de Fiziko en Purdue Universitato, Usono, verkis sespaĝan artikolon: **Pri la kalkulado de elektromagnetaj fenomenoj per kampo de neŭtraj vektor-mezonoj kun neglektebla maso**. Ambaŭ artikoloj havis mallongan anglalingvan resumon.

Trovinte la pli fruan artikolon en la gazeto, Prof. Belinfante skribis al Japana Esperanto-Instituto por peti kontakton kun japanaj fizikistoj. La menciita Instituto Japana plenumis lian peton kaj instigis lin verki artikolon por la nomita gazeto. La artikoloj vekis sensacion inter japanaj fizikistoj, kiuj esprimis favoron por la uzo de Esperanto en tiu fako. Versajne multaj artikoloj en Esperanto sekvos. Ni esperu!

Foreign trade and communication is easier and cheaper with Esperanto.

Dr. F. Wiener, formerly of Germany, now of the University of Liverpool, England.

Hon. Doreen Caseleyr with his wife, Mme. Camille Caseleyr. Mr. Caseleyr is Belgian general consul at Belgian Congo, Africa, and a prominent writer who is coming to this country to make arrangements for the publication of some of his books. He may remain in this country for a time in an official capacity for his government.

S-ro Hilario Zayas, an official of the Cuba Electric Co., and a director of the Rotary club of Manzanillo, Cuba.

There will be others. We shall keep our world-wide readers informed of all contemplated visits as soon as we receive word from the parties concerned, or from our correspondents in the respective countries.

For the benefit of our educational, cultural and civic leaders in this country we should like to add that all of the above mentioned visitors will be available for public appearances, talks and lectures, and that they can be contacted through our Lecture Bureau.

ESPERANTO IN A SCIENCE GAZETTE

In the important scientific periodical, **Progress of Theoretical Physics**, published quarterly in Japan, but printed chiefly in the English language, there appeared in 1948 two articles written in Esperanto. In the April-June, 1949, issue of this publication, two more Esperanto articles appeared. Shoyei Miyahara, of Nagoja University, wrote a nine page article entitled, "About the theory of collective electronics of ferromagnetism."

Prof. F. J. Belinfante of the faculty of Physics of Purdue University, a highly esteemed member of our Foundation, contributed a six-page article "About calculating the electromagnetic phenomena in the field of neutral vector-phases and involving inappreciable mass." Both articles in question contained a brief resume in English.

Having found the first-mentioned article in the gazette above, Prof. Belinfante wrote to the Japanese Esperanto Institute in order to be put in touch with Japanese physicists. That Institute in turn satisfied his wish by way of suggesting that he compose an article for the periodical cited above. Both articles were instrumental in creating quite a sensation among Japanese physicists who manifested a desire to favor Esperanto for use by that faculty. Undoubtedly many additional articles in Esperanto will follow. Let us hope!

TO OUR READERS

Because we are presently in the midst of preparing Esperanto textbooks for publication, and not being able to get any competent help, it is temporarily necessary to reduce the size of USONA REVUO. As soon as this major project is completed, USONA REVUO will resume its full size, and will appear in more attractive form than ever before.

OUR BOOK LIST

We now have, and soon shall have a more complete selection of Esperanto books in stock:

Esperanto Reader	\$0.95
Bible in Esperanto	2.25
Historio de Kristo de G. Papini ..	2.75
Katolika Katekismo de Sac. J.	
Bianchini45
Prayer books in Esperanto45
Esperanto Daily Exercises40
Esperanto Book of Phrases40
Stories for Boys and Girls in	
Esperanto75

Interlanguage Foundation, Inc.
1020 W. Lincoln Ave.
Milwaukee 15, Wis.

USONA REVUO

United States World Review
Published monthly by the

Interlanguage  Foundation, Inc.

1018-20 W. Lincoln Ave.
Milwaukee 15, Wis., U.S.A.
Phone: ORchard 2-2040

Dr. Léon A. Nowak
President — Prezidanto

Monata gazeto internacia de
Interlingva Fondaĵo, (Korporacio)

S. A. Klukowski
Redaktoro — Editor

Membroj de TEJA
Tutmonda Esperanta Ĵurnalista Asocio
(Members of the Worldwide Esperanto Journalists
Association)

Yearly subscription\$1.50
Jarabonprezo\$1.50

Kara Dio, donu al ni la forton akcepti kun sereneco tion kio ne povas esti ŝanĝita. Donu al ni kuraĝon ŝanĝi tion kio povas kaj devas esti ŝanĝita. **KAJ DONU AL NI LA SAGECON DIFERENCI GI UNU DE LA ALIA.**

—Admiralo Hart.

Dear God, give us strength to accept with serenity the things that cannot be changed. Give us courage to change the things that can and should be changed. **AND GIVE US WISDOM TO DISTINGUISH ONE FROM ANOTHER.**

—Admiral Hart.

DE REDAKCIO

LA PENSOJ VAGAS ...

La estiminda redaktoro de Franca Esperantisto—Kompreni, skribante sciigon pri Usona Revuo, nomas nian gazeton erare: Usona Esperantisto. Tamen ĉiu leganto, kiu scias iom pri nia movado kaj geografio de Amerika kontinento komprenos, ke temas pri nia Revuo, ĉar Milwaukee (Usono) estas menciita.

Kaj kia estas opinio pri nia gazeto? Jena:

“Bona prezentado, interesa elekto de artikoloj mallongaj sed havantaj internacian karakteron ...”

Estas agrable legi tian valoran opinionon. Ni penados meriti ĝin en estonto.

KORAJN DANKOJN!

Inter multaj de niaj membroj, legantoj kaj amikoj, kiuj sendis al ni bondezirajn kartojn okaze de Kristnaska kaj Novjara festoj, trovis sin du kiuj ne nur skribe sed alimaniere esprimis siajn bondezirojn. Unu el ili estas s-ano A. I. Rogus, el Passaic, N. J., kiu sendis dek dolarojn por subteni nian Fondaĵon. Li jam estis aktiva membro de nia Fondaĵo kaj nun igis membro-subtenanto; la alia estas nia bona amiko advokato victor A. Napieralski, komisiano juĝa de provinco Milwaukee, kiu sendis cent dolarojn kaj igis vivmembro de nia Fondaĵo. Al ĉiuj niaj amikoj, legantoj kaj membroj ni esprimas korajn dankojn, kaj reciproke ni deziras al ili bonŝancon, bonsanon kaj feliĉon en la jaro 1950 kaj ĉiam.

VIZITO DE D-RO SOLZBACHER

Ni havis veran plezuron gastigi en nia urbo, en nia Esperanta Domo kaj en nia hejmo d-ron W. Solzbacher, bonkonatan Esperantiston, prelegiston kaj prezidanton de EANA. Li alvenis la 17-an de Januaro kaj ni kune pasigis plej parton de posttagmezo en nia oficejo, kie li ankaŭ renkontis nian prezidanton, d-ron L. A. Nowak. Ni montris al nia estimata gasto nian tutan presejon kaj oficejojn.. Poste vespere la redaktoro kaj lia edzino havis plezoron gastigi d-ron Solzbacher hejme kie ni babiladis agrable pri diversaj interesaj aferoj ne-esperantaj, speciale pri niaj spertoj en diversaj landoj de Eŭropo. Ni trovis nian gaston tre interesa rakontisto, ankaŭ agrable kaj aminda homo. Kvankam antaŭe, dum nia interparolado pri la esperantaj aferoj en nia oficejo, ni malkonsentis pri certaj aferoj koncerne la staton de Esperanto en Usono kaj pri maniero de ĝia disvastigado.

La 18-an de Januaro d-ro Solzbacher prelegis en du katolikaj lernejoj en Milwaukee, nome, en kolegio Marimonto kaj en akademio de Sanktaj Anĝeloj. La temoj de liaj paroladoj ne estis esperantaj, sed li saĝe menciis ankaŭ Esperanton.

Estis malfacile disiĝi de nia ŝatata gasto kiam ni devis lin adiaŭi ĉe la stacidomo je la 4-a horo posttagmeze.

PASTRO KUBACKI NE VIVAS

Dum esperantaj gazetoj diverslandaj ĝis nun presas rezoluciojn kontraŭ skizmemma pastro Johano Kubacki, pro lia peno arbitre ŝanĝi la esperantan alfabeton—li jam de longe ne vivas. Ni ne scias ekzaktan daton de lia morto, sed ni ricevis sciigon pri tio ankoraŭ en septembro, 1949, kiam la banko resendis al ni lian bankĉekon por abonkoto kun rimarko, ke lia konto estas fermita. Pastro Kubacki forlasis Milwaukee dum la lasta somero kaj revenis al la ŝtato Indiana, kie li antaŭe loĝis. Kiam ni malfarmis la oficejojn de nia Fondaĵo kaj eldonejo, anoncis la eldonadon de Usona Revuo, li vizitis nin kaj oferis altan sumon, kondiĉe, ke ni redaktu la Revuon laŭ lia “simpligita” alfabeto. Sed ni decide kaj firme rifuzis. Tiam li retranslokiĝis al lia malnova loko. Laŭ kutimo, ke pri mortaj homoj oni ne devas ion malbonan diri, ni volas rimarki tute sincere, ke malgraŭ lia obstineco koncerne esperantan alfabeton, Pastro Kubacki estis tre agrable kaj bonkora homo. Li restu en pacon!

NI REPLIGRANDIGOS REVUON

Ĝis kiam ni eldonos la nepre bezonatajn Esperantajn lernolibrojn, legolibrojn kaj aliajn presajojn por niaj lernejoj, kiuj jam enkondukis aŭ intencas enkonduki Esperantajn klasojn, ni devis primalgandigi la Usonian Revuon. Ĉar la redaktoro estas treege okupata, li ne povas sole plenumi ĉiujn taskojn; sed estu certa, ke en proksima estonto ni ne nur repligrandigos nian Revuon, sed aldonos belkoloran kovrilon.

Foreign trade and communication is easier and cheaper with Esperanto.

RESPONDOJ DE REDAKCIO

Al verkistoj—inter kiuj estas bonaj, malnovaj, ŝatataj amikoj diverslandaj—kiuj sendis al ni siajn esperantajn verkojn por presigi ilin en nia eldonejo, ni devas klarigi, ke ni volonte tion faros en venonto, sed ne povas plenumi tion nun pro la sekvantaj kaŭzoj:

En Usono ankoraŭ estas tre malmulte da homoj kiuj povas legi Esperanton. Kiu do legos noveldonitajn de ni esperantajn librojn? Krom tio la kosto de presado estas tre alta, pro la alta pago de preslaboristoj kaj alta prezo de papero, klišoj ktp.

Antaŭ ol ni komencos eldonadi esperantajn librojn ni nepre devas pligrandigi vicojn de Esperantistoj. Kaj tion ni faras laŭpove. Ni nun pretigas kaj presigas esperantajn lernolibrojn kaj legolibrojn por komencantoj. Ni eĉ tion preferus ne fari, se ni ne estus devigitaj, pro la ekzistanta monopolo, pri kiu ni jam skribis sufiĉe multe. Ĝi kreis la stagnadon de nia movado en Usono, kiun ni konstante forigas kaj post ne-longe esperas forigi entute.

* *

S-ro F. C., Maroko:—Jes, oni povas pagi abonkoton por Usona Revuo per internaciaj respondkuponoj—15 jare.

* * *

D-ro W. A. N., Germanujo, usona zono: Ni ricevas dekojn da leteroj similaj al via, sed malgraŭ niaj plej bonaj intencoj, la redaktoro ne povas plenumi alsenditajn petojn, ĉar tio estas ekster la povo. Ni penadis interesigi viajn samlandanojn pri via sorto kaj de via ŝatata familio—sed vane. Krom tio, nia ŝtato de Viskonsino ne permesas eksterlandajn kuracistojn praktiki iliajn profesion. Bedaŭrinde!

* * *

MEMBROJ de TEJA kaj ESPERANTO-PRESS:—Bonvole sendu al ni matricojn kune kun viaj raportoj, se vi deziras ke ni presigu ilin en U.R. Fotografioj ne taŭgas, ĉar fari el ili klišojn estas tro altekostas elspezo. Tamen ni volonte rekomencos al Kolegoj, kiuj ensendos matricojn aŭ klišojn pri interesaj internaciaj, aŭ Esperantaj temoj.

EL SVEDUJO—FROM SWEDEN

Stockholmo la 11:an de nov. 1949
Kara Sinjoro Klukowski:

Mi sendas al vi mian plej koran saluton kaj gratulon por la apero de nova gazeto en Usono, nome la Usona Revuo. Mi legis ĝin kun granda intereso kaj trovis ĝin tre bone presita kaj ankaŭ riĉenhava. Mi esperas ke la Usona Revuo montras la veran vojon por la esperantistaro en Usono al venko por nia internacia lingvo. Vivu la esperantistaro de Usono! Sincere kaj fratece salutas vin.

Internacia Grafika Esperanto Ligo (I.G.E.L.)
N. Rönnbäck.

“I am not an Athenian or a Greek, but a citizen of the world.”

—Socrates

GRAMATIKAJOJ LA AFIKSOJ

En la historio de Esperanto, la afiksoj ludas gravegan rolon. Zamenhof mem, en letero al Borovko, dum 1895, rakontas detale kiel impresis al li iufoje la rusan afiksadon.

“En la Bjelostoka reala lernejo, li diras, mi komencis malklare revii pri nova arta lingvo, sed min timigis la dikaj vortaroj. Unu fojon, kiam mi estis en la sesa aŭ sepa klaso de la gimnazio, mi okaze turnis la atenton al (li citas kelkajn rusajn sufiksojn). Mi subite ek-sentis teron sub la piedoj; sur la terurajn, gigantajn vortarojn falis radio de lumo, k ili komencis rapide malgrandiĝadi antaŭ miaj okuloj. La problemo estas solvita, mi diris tiam. Kaj mi kaptis la ideon pri la afiksoj k komencis laboradi en tiu ĉi direkto. **Mi komprenis, kian grandan signifon povas havi, por lingvo konscie kreata, la PLENA uzado de tiu forto kiu, en lingvoj naturaj, efikas nur parte, blinde, neregule, k neplene.**”

Kaj efektive li komencis formi la lingvon laŭ la sistemo alfikseble algluanta: ĉiu radiko, li elektis 918, estas alglue alfiksite al alia por nuancigi, modifi k eĉ kontraŭigi ĝian sencjon; laŭ rolo nur ludata antaŭe de la afiksoj. Ekzemple, la radiko verba ir—povas algluiĝi “prefikse” al aliaj k formi: rapid-iri, foriri, foriranto, piediri, piedirado, aliri, aliro, ĉevaliri, reiri, kuniri, soliri, ke ke. Simile ĝi povas algluiĝi “sufikse” por diri: irebla, irejo, ir-ilo, irado, irulo, ir-gi, ir-eti, ke. Tute egale kiel oni ludas per afiksoj, prefiksoj k sufiksoj. Por plifortigi la sistemon, Zamenhof diras en sia Plena Gramatiko, regulo 11, kiam li difinas la karakteron algluantan de la lingvo E.: “Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino.” Kaj li aldonas por montri la ĝeneraligon de la regulo: “la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.” Tio estas, ĉiu vorto estas memstara k, pro la karaktero algluanta de la lingvo, alfiksebla al alia, prefikse aŭ sufikse.

Ni ŝuldas do ne nur la ekzistadon de la lingvo, sed ĝian karakteron algluantan, al la afiksoj. Zamenhof, kiu pensis nur sendube pri kelkaj, decidis fari alfikseblajn ĉiujn vortojn, laŭ plena uzado de tiu “alfiksa” forto, “**kIU en lingvoj naturaj efikas nur parte, blinde, neregule k neplene.**”

Zamenhof konservis gramatike tamen, la nomon “afikso,” sendube por ne rompi la ĝeneralan lingvan tradicion, ankaŭ pro dankemeco, ĉar per la afiksoj li trovis la mekanikon de la lingvo. Sed reale, per tia sistemo, la afiksoj malaperis, aŭ kio estas egale, la tuta radikaro formiĝis per alglueblaj afiksoj.

Tiu teorio surprizos speciale al tiuj gramatikistoj, kiuj, krom la restantaj prefiksoj k sufiksoj, volus oficialigi: Pseŭdoafiksoj, pseŭdoprefiksoj k pseŭdosufiksoj; Afiksoidoj, prefiksoidoj k sufiksoidoj; Pseŭdoafiksoidoj, pseŭdoprefiksoidoj k pseŭdosufiksoidoj; Kvazaŭafiksoj, kvazaŭprefiksoj k kvazaŭsufiksoj; Kvazaŭafiksoidoj, kvazaŭprefiksoidoj k kvazaŭsufiksoidoj, ke, ke. Krome, ili ne nur volas oficialigi ilin, sed kio estas pli grava, devigi nin la esperantistojn uzi tiajn krudajn barbarismojn.

Meksiko.

Francisco Azorin.

LA TRIUMFO DE L' ALKOHOLO

Prof. Moso

Mi nomas min alkoholo! Mia reĝolando estas la tuta mondo. Kiu egaligis min? Kiu estas pli forta kaj pli potenca ol mi? Mi estas reĝo super la reĝoj, potenculo super la potenculoj. Mia fortego estas neelĉerpebla, mia aŭtoritato senlima. Mi venkis jam kaj ekstermis la tutajn naciojn, mi detruis kaj ruinigis centfoje pli ol milito, malsato kaj brulegoj. Mi havas ja ĉie tutajn legiojn de adeptoj kaj adorantoj.

Mi nomas min alkoholo! Kiu egaligis kun mi, kiu? Milionojn da homoj mi jam ruinigis kaj pereigis. Mi ŝirmas nenium socitavolon kaj nenium aŭtoritaton. Mi gardas nenian agon kaj nenian sekson. Kiun mi ekkaptos, tiun mi retenas kaj malsuprentiras en kotajon, ĉu li estas riĉulo, aŭ almozulo.

Mi nomas min—alcoholo! De junulo mi forprenas la sanon, de virgulino la honoron, de viro la forton kaj de virino—la honton. Mi faras el homo ŝteliston, falsejuriston, perfidulon kaj eĉ mortiginton. Miaj adeptoj kaj adorantoj turmentas senkompate siajn edzinojn kaj infanojn; ili levas manon kontraŭ siaj patroj kaj patrinoj. Ekzistas neniu diaj ordojn kaj homaj leĝoj, kiujn ili ĉiutage ne trapaŝas kaj eĉ ne perfortus.

Mi plenigas ne nur malliberejojn, sed ankaŭ frenezulejojn, hospitalojn kaj azilojn. Kio estas ĉiuj krueluloj kompare al mi? Mi estas pli terurego ol barbara Nerono, pli potenca ol milito kaj pesto. Mi estas kvazaŭ idolo Moloho, al kiu oni oferas volonte honoron kaj havaĵon, edzinon kaj infanojn, korpon kaj animon. En mia regno la suno neniam subiras. Mia potenco estas nemezurebla kaj mia regado severa kaj tirana.

Kiam oni eltrovis min, oni imagis, ke aperis la fluidaĵo de la vivo, kaj jen mi estas nur trinkajo de la morto kaj de grandega malfeliĉo por ĉiuj popoloj. Mi promesas plifortigi, pligoĝigi la animon—kaj mi senkonsciigas kaj deprimas ĝin; mi promesas bonhumoron kaj ĝojon—kaj anstataŭ tio mi kaŭzas mizeron, kruelaĵojn kaj perfortojn.

Dum holerepidemio oni elstarigis min kiel certa profilaktajo, sed eĉ tiam mi trompis la esperon kaj la holero ensorbis dekfoje pli da drinkuloj ol sobruoloj. Mi vestas min en rava vestaĵo, mi vojaĝas tra la mondo sub la bruaĵaj nomoj kaj mi scias lerte tikli kaj ĉarmi sentamon de miaj subuloj. Ekvidu nur diverskolorajn afiŝojn surgluitajn sur la urburoj kaj stratoj; ekrigardu anoncojn en ĉiutagaj gazetoj kaj ilustritaj jurnalaj, kiuj, publikigas mian gloron—sed ĉio ĉi estas nur mensogo, perfido kaj trompaĵo. Ekrimarku orbrilajn kaj arĝentkolorajn surskribojn sur boteloj; ekrimarku multekostan fluaĵon en pokaloj, kiam ĝi brilas kaj ŝaŭmas—sed ĉio ĉi estas nur mensogo, perfido aj trompaĵo. Mi promesas la korpon varmigi aŭ malvarmeti, nervojn eksciti aŭ krietigi, doni trankvilon kaj forgeson—sed ĉio ĉi estas nur mensogo kaj perfido!

Rigardu! Jen en la foso kuŝas homo. Lia familio atendas lin jam delonge. Li promesis al siaj plej proksimaj veni hejmen tuj post la laboro, ĉar unu el liaj infanoj estas malsana kaj luktas kun la morto. Sed mi retenis lin survoje kaj flustris en lian oreilon: “Ne iru hejmen,

tie atendas vin ĉagreno; iru kun mi iom amuzigi, trinku nur malgrandan glaseton kaj viaj malĝojoj kaj ĉagreno malaperos. Kaj kiam li obeis min, li jam apartenis al mi. Vekiginte kaj reveninte hejmen post kelhaj horoj, li trovis sian infanon mortinta.

Ĉu vi vidas tie ĝendarmon kaj kondukatan tra la stratoj krimulon? Li mortigis sian kamaradon ĝuste ĉe botelo da brando, ĉar ili ambaŭ malpacigis ĉe la kartludo. Ĉi tio estas ankaŭ mia afero.

Rigardu ĉi tiun infaneton kuŝantan sur mizera tabullito kaj suferantan je konvulsio—ĝia vivo estas venenita jam de unuaj tagoj, ĉar ĝiaj gepatroj estas subuloj kaj sklavo. Ĉi tio estas ankaŭ mia afero.

Observu tiujn ŝanceliĝemajn personojn kun besta vizageprimado kaj salivaj lipoj, kun sangumitaj okuloj—ĉiuj ili estas miaj sklavo drinkuloj. En malmola servo ili estas ĉe mi. Ĝis sango mi vipas kaj turmentas ilin. Ilia ekscitita sango kuras kiel fajro tra la vejnoj, sed ili devas ĉiam trinki por estingi ĉi tiun internan fajron, inferan fajron. Mi vestas ilin en ĉifonajojn, iliajn infanojn mi suferigas per malsato kaj malvarmo, mi salajras ilin per eterna morto, sed ili ne ĉesas drinki.

Kaj kiu kuraĝas detru mian potencon? Kiu estas kapabla liberigi miajn sklavojn? Ĉu scienco kaj klerigo? Montru al homoj en kiel eble plej nigraj koloroj la danĝerojn, minacantajn al ĉiuj, kiuj uzadas alkoholon. Konfirmu viajn konkludojn per klaraj ciferoj; indiku, ke laŭ sperto kaj statistiko je ĉiu cento da memmortigitaj kaj je ĉiu cento da frenezuloj venas po 70 drinkuloj; ke en cento da diversaj krimoj—75 sub la influo de alkoholo efektive; ke multe pli frue ol fizikan vivon, mi ruinigas ekstenton de devo, honto kaj respondeco. Kia rezulto de ĉi tio? Jen en la plej bona okazo kelkaj malfidelaj drinkuloj pripensas la aferon kaj forjetos la glaseton por semajno, monato, jaro—pli malofte por ĉiam. Aliaj restas fidelaj al mi!

Mi kondukas miajn sklavojn al pereoj kaj kondamno. Demandu ilin kiomfoje ili intencis ekkomenci la novan vivon, vekiginte matene post fordrinkita nokto kun malplena kaj doloriga kapo, kun rigidaj aŭ vunditaj membroj, kun disŝiritaj kaj malpurigitaj vestoj kaj kun senmonigia poŝo? Kaj kiam ili denove perlaboris la monon, ili ree apartenis al mi. Mi helpas al ili forgesi la bonajn intencojn kaj promesojn. Oni vokas kontraŭ mi policistaron kaj statan leĝdonon, kvazaŭ mi timus tiajn paraĝaĵojn. Tuŝu min nur iu ajn—kaj senprokraste ekstaras je mia defendo miloj da batalantoj, en unua vico grandaj taĉmentoj da alkoholfabrikantoj, drinkejestroj, restoraciistoj kaj brand-industriistoj, kiuj per sia veplendo plenigas la tutan mondon.

Laŭvere—neniu en la mondo posedas tiom da amikoj sindonaj kaj fidelaj, kiel mi. Tial mia potenco estas grandega, mia regado nevenkebla. Mi ruinigis jam milionojn da homostajoj—kaj mi ruinigos ankoraŭ pli multe. Mi estas ĉiopovulo, la plej danĝera malamiko de la vivo, la plej giganta tirano.

Mi nomas min alkoholo!!!

ESPERANTO LINGUAPHONE HOME STUDY COURSE

You can learn the universally accepted and used international language in your own home, by the Linguaphone Ear-Eye Method.

The complete Esperanto Course, consisting of fifteen double faced records and accompanying textbooks, is \$50.

Payments gladly arranged for responsible persons.

Interlanguage Foundation, Inc.

1018-20 W. Lincoln Ave.

Milwaukee 15, Wis.

What Is The Esperanto Inter- language Foundation, Inc.?

The Esperanto Interlanguage Foundation, Inc., is a non profit, educational, cultural, and service organization, established for the purpose of coordinating all activities of the Esperanto Movement in America; to promote in every way the teaching, study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto, as means of international communication; to promote good will and understanding among people of all nations; to stimulate world education, free exchange of information, world trade, and to foster better international human relations by:

- Publishing and distributing literature containing information about Esperanto.
- Publishing text books, readers, etc., for school and home use.
- Promoting the formation of new local groups and classes.
- Conducting a lecture bureau, and promoting lectures and conferences.
- Conducting an information center regarding world travel, and providing contacts with people in other lands for educational, cultural and social purposes.

WHO CAN BECOME A MEMBER?

Any person may become a member who subscribes to the ideals and purposes of the Esperanto Interlanguage Foundation.

Any dues paid or contributions made to the Interlanguage Foundation are deductible from your income tax.

Membership classifications: Regular member \$3; Student member \$1; Active member \$5; Sustaining member \$10; Donor member \$25 or more; Life member \$100. *All memberships, except students include subscription to the U. S. Esperanto Review.

APPLICATION FOR MEMBERSHIP

I, the undersigned FRIEND OF ESPERANTO, am in full accord with the movement to promote good-will, unity and understanding among nations of the world. I feel that in this great era of prodigious scientific advances such as radio, television, rockets and atomic energy, we are compelled to think and act intelligently in world-wide terms. It is to our own best interests to make ourselves clearly understood and to understand others. Therefore, for all educational, cultural and practical purposes, I am encouraging the teaching, study and use of the neutral international auxiliary language, Esperanto, and I pledge my support to help it accomplish its great task and benevolent program for the good of humanity.

Please enroll me as a.....

member. I enclose \$.....

DATE

NAME

(Please Print)

ADDRESS

CITY.....ZONE NO.STATE.....

OCCUPATION

(Signature).....

Please send membership fee with application to:

INTERLANGUAGE FOUNDATION, INC.
1020 W. Lincoln Ave., Milwaukee 15, Wis.

VASHINGTONA BANKVEDO STIMULAS ĜOJIGAJN GEESPERANTISTOJN

S-ro. William E. Baff, nia Vaŝingtona korespondanto, raportas ke li aranĝis bankvedon, kiu, je 15a de Decembro, 1949, festis la datrevenon de nasko de la majstro: Dr. L. L. Zamenhof kun entuziasma rigardo. Ĉeestis tiam 17 partoprenantojn. Oni malfermis la aferon kun preĝo en Esperanto, kaj, post la vespermanĝo, kelkaj lertaj geesperantistoj parolis Esperante kaj Angle pri memorindaĵoj el la vivo de Dr. Zamenhof. Inter la ĉeestintoj estis S-ro Joseph Leahy, dum multaj antaŭaj jaroj Sekretario de E.A.N.A.; S-ro. M. Villareal, Filipina publikisto; S-ro. Thomas Goldman, iatempa vic-konsulo en Holando por Usono; S-ro. P. Shopalovich, antaŭe vic-prezidanto de Beograda Esperanta Klubo, Serbujo; S-ro. Wilfred Rouleau, instruisto ĉe George Washington Universitato, Washington, D. C.; F-ino. Josephine Kruka, instruistino de Angla lingvo en Havana, Cuba; S-ro. James Overbeck, de Hot Springs, Arkansas, konata prelegisto; F-ino Andree Thibault kun U N organizacio; S-ino Maude S. Taylor, Baha'ista kunlaborantino; S-ino. Leila Marshall, loka klubarano. Oni kantis la Esperantistan himnon "La Espero" kun vigleco. La partoprenintoj estis, ĉiuj, fotografitaj kontraŭ fono de Esperanta standardo. Prezidis S-ro. Baff kiu anoncis ke je la 17 an Januaron, 1950, oni havos bonvenigan kunvenon por reaktivigi estintan Washington Esperanto-Klubon.

WASHINGTON BANQUET IN- VIGORATES JOYFUL BODY OF ESPERANTISTS

Mr. William E. Baff, our Washington correspondent, reports that he arranged a banquet on December 15th, 1949, which celebrated the anniversary of the birth of the master, Dr. L. L. Zamenhof, with enthusiastic respect. In attendance were 17 participants. The affair was opened with a prayer in Esperanto, and, after the dinner, several adept Esperantists spoke in Esperanto and in English about mementos stemming from the life of Dr. Zamenhof. Among those present were: Joseph Leahy, who for many years was Secretary of the Esperanto Assoc. of North America; M. Villareal, Philipino publicist; Thomas Goldman, former vice-consul in Holland for this Government; P. Stopalovich, formerly vice-president of the Belgrade Esperanto Club in Serbia; Wilfred Rouleau, instructor at George Washington University, Washington, D. C.; Miss Josephine Kruka, instructor of English in Havana, Cuba; James Overbeck of Hot Springs, Arkansas, well-known lecturer; Miss Andree Thibault with U. N. organization; Mrs. Maude S. Taylor, Baha'ist collaborator; Leila Marshall, local multi-club representative. The Esperantist hymn, "The Hope," was sung with spirit. All participants were then photographed against the background of the Esperanto standard. Dr. Baff presided and announced that on January 17th, 1950, a Rally would be held for the purpose of reviving the extinct Washington Esperanto Club.

Foreign trade and communication is easier and cheaper with Esperanto.

SHALL WE RUN THIS?

Letters to the Editor

Chicago, Ill.

January 20, 1950

Editor:

To teach these foreigners to respect the American language I hope you will run this little item about the word "run," so they will see what a plain and clear language they run into.

The boys run fast, but because the dye is fast it won't run. The street car runs every 10 minutes, but only if the motor-man runs it. The streetcars are run by the city politicians, that is by the ones who run and get elected. On some streets the tracks run in the center. The cars are badly run down. The police run down criminals; cars run down people; and candidates for public office run down their opponents or those they run against.

If you run into a girl and run your eye down her leg you may see a run in her stocking and runover heels. You can run into her without a collision, but if you run into her with a car and keep on going you run over her. That isn't like running over a piece of music. The money women spend on beauty runs into several billion dollars annually, but that doesn't help pay the bills when one runs into money otherwise.

Some kids have the run of the house and run us ragged even when we think we run it. And there are sheep runs and 750 other meanings of "run." So why doesn't everybody learn a good, simple, plain language like American?

—L. E. K.

P. S.: This would have run longer if I hadn't run out of paper, and I didn't want to run out to get any, so let it run as is.

EL GERMANIO—FROM GERMANY

Munchen la 5-an de decembro, 1949
Altestimataj gesamideoj!

Mi apartenas al la adeptoj de la Esperanto movado (Esperantismo) kaj nuntempe mi vivas en Germanujo.

Vizitante (pro miaj devoj) multajn gravajn (grandajn) urbojn de Germanujo mi nepre vizitas kunvenojn de Esperantaj grupoj kaj ĉie mi organizas transporteblajn ekspozicieojn de esperantaj gazetoj, ĵurnaloj, korespondaĵoj, fotoaĵoj de esp. grupoj kaj aliaj esp. montnaĵoj, klarigantaj stanojn kaj rolon de Esperanto kiel Helpa Internacia Lingvo.

Atentante tion mi petas esp. organizojn kaj ankaŭ geesperantistojn alsendi al mi gazetojn, ĵurnalojn, tabelojn kaj aliajn esp. materialon por ke ni povu uzi ilin kiel ekspozicieon por varbi novajn anojn kaj tiel disvolvi (progresigi) nian movadon.

Atendante vian favoran respondon je mia alvoko, mi restas

Sincere via

Dr. W. Nejmitz

(Docento D-ro med.

W. A. NEJMITZ)

Mia adreso: Docento D-ro med. W. A. NEJMITZ, (13b), Munchen 13, Schwere Reiter Strasse 4, Luitpold Kaserne, Medical Section, Block 6, Room 302, U. S. Zone, Germany.